

Francilia federacio

KomitatKunsido (KK) 13/01/2023

Partopreno

- Pierre Gauthier, vic-kasisto kaj reprezentanto ĉe Espéranto-France (PG) ĉeestas
- Marc Giraud, prezidanto (MG) ĉeestas
- Didier Janot (DJ) rete ĉeestas
- Aleks Kadar, vic-sekretario (AK) ĉeestas
- Aurélien Lestage (AL) ĉeestas
- François Lo Jacomo (FLJ) ĉeestas
- Didier Loison, kasisto (DL) rete ĉeestas
- Laure Patas d'Illiers, sekretario (LPI) ĉeestas
- Marianne Pierquin, vic-prezidanto (MP) ĉeestas
- Guillaume Vera-Navas (GVN) ĉeestas

Ekde la antaŭa KK

La protokolo de la KK de la 02/12/22 estis aprobita kaj enretigita ĉe <https://esperanto.paris/komitat-kunsidoj>

17/12/22, la ZamFesto kontentige okazis ĉe la fervojistoj. DL kaj LPI prizorgis bufedon kaj vendis librojn. Estis miskompreno pri la bufedo, do estis 2 bufedoj, la nia kaj tiu de FFCE, ĉar neniu konfirmis al ili ke ni prizorgos la bufedon, pasintfoje Sylviane membris en nia komitato, sed ne plu; venontfoje ni informu prie.

07/01/23, la reĝkuko kontentige okazis, venis trideko da homoj, interalie novuloj: lernantoj de kurso kaj veraj novuloj.

MG sendos mesaĝon de novjaraj bondeziroj al la lokaj asocioj, FFCE, SAT Amikaro, Eo klubo de Romo (jam farite), respondeculo pri asocioj en Parizo Centro.

MG sendis mesaĝon al niaj membroj: novjara bondeziro, instigo al realiĝo al Espéranto France, instigo al kandidatiĝo al la Komitato.

Kursoj

La kursoj malokazis dum la lernejoj jarfinaj ferioj. Ni ricevis petojn de informoj pri kursoj, eble estos pliaj lernantoj.

- komencantoj, gvide de PG, ĵaŭde 19h-20h30, surloke, 5 lernantoj
- progresantoj, gvide de MP, lunde 18h30-20h, surloke, 5 lernantoj
- progresantoj, gvide de MG, vendrede 18h-19h30, rete per Skype, 4 - 10 lernantoj
- spertuloj, gvide de FLJ, marde 18h30-20h, surloke, 2 - 5 lernantoj

Por la venonta jaro MP deziras elekti lernolibron. Ŝi starigas la demandon: kiu pagos la librojn? Ĉu ĉiu lernanto? Ĉu nia asocio? Ĉu dumjara pruntedono? Ni pritraktos la temon dum iu venonta KK.

FLJ registris sian kurson en la retejon Edukado.net (la loko estu "Parizo", ne "Paris"). Anna Löwenstein vidis tiun kurson kaj proponis al FLJ akcepti ŝiajn 22 spertajn lernantojn. La reta kurso de MG ne taŭgas pro la malsamaj niveloj. FLJ pristudos la bezonojn de ŝiaj lernantoj kaj vidos ĉu retigi sian kurson.

Atentu: ĉiu instruisto devas kontroli ke ĉiuj lernantoj pagu kaj la kurson kaj la kotizon. Vidu la detalojn en la protokolo de decembro <https://esperanto.paris/IMG/pdf/2022-12-02.pdf>

=> Ĉiu instruisto sendu liston al DL kaj DL kontrolos la pagojn el Arthur

Informi pri kursoj

En nia retejo, en la paĝo pri kursoj, aperis informo pri nova kurso de la fervojistoj sed la informo pri la parizaj kursoj de SAT Amikaro malaperis, endas republikigi ĝin. La problemo estas ke por informi en nia retejo pri la parizaj kursoj de SAT Amikaro ni bezonas krei ligilon al la paĝo de la retejo de SAT Amikaro kiu priskribas tiuj kursojn. Sed la retejo de SAT Amikaro ne estas ĝisdatigata. Necesas unue peti SAT Amikaron por ke ili publikigu informojn pri iliaj parizaj kursoj en sian propran retejon. Poste ni povos informi prie en nia retejo. Necesas kontakti la parizanajn SAT Amikojn telefone aŭ per retmesaĝo. (<https://sat-amikaro.org/pariza-grupo-groupe-parisien>) (https://eventaservo.org/o/SAT_Amikaro)

Pli ĝenerale, estus bone publikigi liston de ĉiuj kursoj en Francilio, ĉar ni ricevis mesaĝojn de homoj loĝantaj ekster Parizo kiu serĉas surlokan kurson proksime de ilia hejmo. Kiel koni ĉiujn kursojn? Ni povas sendi mesaĝon al la lokaj kluboj kiujn ni konas, kaj sendi mesaĝon al la listoj amikaroj kaj membroj petante ke oni informu nin kiam oni gvidas kurson. LPI sendos mesaĝojn.

Kotizo

Antaŭe Espéranto-France redonis al ni 10% de la kotizo de ĉiu kotizanto. Esperanto-France altigis sian kotizon sed ĝi plu donas al ni la saman sumon kiel lastjare. PG petu, ke ni ricevu 10% de la nova kotizo.

Vizito de la Romanoj (17-19 marto 2023)

Nia asocio invitas la Romanojn en Parizon, kadre de nia jarkunsido, dum semajnfino en marto: 17an, 18an kaj 19an de marto 2023.

MG proponis laborteamon, kiu kunsidis lastan mardon, por prepari la viziton.

- provi ekscii pli malpli la nombron de vizitantoj: probable estos 4, 5.
- detale organizi la programon de la vizito: partopreno al nia ĜA, turismo, biciklado, ludsesio, ktp... Niaj kutimaj monataj eventoj okazos dum tiu semajnfino, GVN bonvolu organizi la bicikladon
- organizi renkontiĝon kun la oficialuloj de Parizo, kun la ĝenerala asocio pri la ĝemelaj urboj Parizo-Romo se ĝi plu ekzistas, kontakti la DGRI : MG sendis mesaĝon al DGRI kaj ricevis neniun respondon. DL donis kontakton de respondeculo pri asocioj (ludovic.sage@paris.fr)
- organizi la loĝadon: nombri kiom da dormlokoj ni mem povus proponi, trovi alian loĝlokon nek tro malproksima nek tro multekosta. FLJ povus gastigi en sia onta luksa domo apud Parizo. La domo ne estas luksa, sed pli granda ol mia persona loĝejo. DL povas gastigi paron en 75012. LPI povas gastigi unu plenkreskulon.

Verdaj ĉapeloj

DJ aĉetis 50 pliajn ĉapelojn <https://esperanto.paris/chapeaux-verts>

Ili kostis al ni po 3,28€ por unu ĉapelo. La vendoprezo estas 5€. Nur 4€ ekde 10 ĉapeloj.

La vendado okazos laŭ 2 manieroj:

- membro de Espéranto-Paris-Ile-de-France faras la vendon, enmanigas la monon kaj transdonas ĝin al la nia kasisto DL
- Said faras la vendon, li transdonas la monon al la nia kasisto DL

Notu bone: en tiu lasta kazo ne estas makleraĵo, kiel ankaŭ ne estas makleraĵo en la inversa kazo (tio estas kiam membro de Espéranto-Paris-Ile-de-France vendas libron de Espéranto-France).

Salono matematika

Ni aliĝos por la venonta salono. Ili deziras ricevi fine de februaro nian materialon (tekstoj, videaĵoj...) por enretigi ĝin. FLJ povos resendi la materialon uzitan lastjare.

Estraro

MG kreis retpoŝtadreson estraro-francilio@googlegroups.com kiu resendadas al la estraro, tio estas la komitatanoj kun specifa rolo.

Kandidatoj al la komitato

Necesas rapide fiksi la liston de kandidatoj al la venonta komitato. Dum la kunsido ni demandas al la nunaj komitatanoj, ĉu ili deziras rekandidatiĝi en 2023:

- Pierre Gauthier, vic-kasisto kaj reprezentanto ĉe Espéranto-France (PG) JES
- Marc Giraud, prezidanto (MG) JES
- Didier Janot (DJ) JES
- Aleks Kadar, vic-sekretario (AK) JES
- Aurélien Lestage (AL) JES
- François Lo Jacomo (FLJ) JES
- Didier Loison, kasisto (DL) JES sed nur vic-kasisto se PG pretas anstataŭi min

- Laure Patas d'Illiers, sekretario (LPI) JES sed petas ke vic-sekretario pretiĝu por anstataŭi min
- Marianne Pierquin, vic-prezidanto (MP) JES
- Guillaume Vera-Navas (GVN) JES

Komitataj kiu rekandidatiĝas bonvolu sendi sinprezenton en kelkaj linioj al LPI antaŭ 06/02/23. Vi povas kopii/modifi vian sinprezenton de 2022 kiu legeblas tie <https://esperanto.paris/IMG/pdf/sinprezentoj-2022.pdf>

Ĉu ni ricevis kandidatiĝojn de novaj homoj? Ne. Laŭ nia statuto, la komitato devas enhavi inter 9 kaj 15 membrojn. Konsiderinte la nunan nombron de kandidatoj, ĉu necesas ke ni serĉu pliajn? Ne necesas, sed indas. La fakto, ke ni jam havas sufiĉe da kandidatoj, ne estas kialo por ne inviti pliajn homojn kandidatiĝi. Krom la invito jam publikigita kun la novjaraj bondeziroj, necesas dissendi unu retmesaĝon nur pri tiu ĉi temo (alvoko al kandidatiĝo), kun klarigo pri la proceduro (kiel eble plej simpla). Tamen ne necesas postkuri homojn, por ke ili kandidatiĝu. LPI sendos mesaĝon al la listoj, insiste petante kandidatiĝon antaŭ 06/02/23 kun sinprezentado. Komitatanoj ne hezitu proprainiciate kontakti eblajn kandidatojn.

Preparo de la ĜA

La ĜA okazos 18/03/23 de la 10a ĝis la 12a.

Decidoj

La membroj voĉdonos antaŭ la ĜA por aprobi la raportojn agadan kaj finanĉan kaj por elektita novan komitaton. Ĉu ni proponos plia(j)n voĉdono(j)n? Pri kio? Pri projektoj? Ne.

Tagordo de la ĜA

- publikigo de la rezultoj de la voĉdonado: aprobo de la 2 raportoj, elekto de nova komitato, aliaj voĉdonoj se ili ekzistas
- prezento de la agadplano por 2023, peti ideojn kaj helpon por nunaj aŭ novaj projektoj

Loko

Kiel praktike okazos la Ĝenerala Asembleo (ĜA)? Ĉu rete, surloke, mikse? Mikse. Ĉu MG aŭ FLJ konsentas pri uzo de ilia reta salono? Guglusalono de MG akceptas ĝis 100 homoj dum ĝis 24 horoj. Ĉu ni petu salonon de la urbodomo de Parizo Centro? Ne

Programo de la tago de la ĜA

Tagmanĝo kun la membroj kaj la Romanoj? Kie? piknike en la sidejo aŭ ekstere se belveteras.

Posttagmeze, ĉu vizito kun la membroj kaj la Romanoj? Kie? decidota antaŭ la fino de januaro

Kiu kandidatas

Ĉiuj kandidatoj devas sendi sinprezenton al LPI antaŭ 06/02/23

Kiel baloti

Ni nun havas 102 membrojn. 5 ne havas retpoŝtadreson. La 5 membroj, kiuj ne havas retpoŝtadreson, ricevos poŝte la dokumentojn en papera formo kaj voĉdonos poŝte. La aliaj membroj ricevos la dokumentojn per retpoŝto en cifereca formo kaj voĉdonos rete per Balotilo.org La reta baloto finiĝos la 17an de marto. La homoj kiuj voĉdonos poŝte devos sendi tiel ke ilia koverto atingu la Ĉerizejon plej malfrue la 16an de marto. Tiel, la rezultoj estos kalkulataj la 17an de marto kaj publikigataj la 18an de marto komence de la ĜA.

Preparo de la dokumentoj

- Invitilo oficiala kun tagordo kaj praktikaj detaloj (ekz reta ligilo): redaktota de LPI kaj MG
- Agadraporto 2022: redaktota de MG
- Agadplano 2023: redaktota de MG (ne sendota)
- Financa raporto 2022: preparota de DL kaj PG
- Balotilo, listo de kandidatoj kaj sinprezentoj: preparota de LPI

Atentu: ĉiuj dokumentoj estu pretaj antaŭ la 10a de februaro. Tiam la estraro validigos ĉiujn dokumentojn rete antaŭ la sendo.

Sendo de la dokumentoj

- La 2 raportoj kaj la sinprezentoj estos disponeblaj en la retejo esperanto.paris
- Al ĉiu membro kun retadreso ni sendos mesaĝon kun: oficiala invito, ligilo al la 2 raportoj kaj sinprezentoj, informo ke la retejo balotilo.org sendos mem individuajn ligilojn por voĉdoni
- Al la membroj sen retadreso ni sendos poŝte: oficialan invitilon, la 2 raportojn, liston de kandidatoj kun sinprezentoj, paperan balotilon, 2 kovertojn por voĉdoni poŝte
- LPI sendos plej malfrue la 18an de februaro

Al la homoj, kiuj aliĝos inter la 19a de februaro kaj la 17a de marto kaj havas retroŝtadreson, LPI sendos la saman mesaĝon por ke ili povu partopreni la baloton kaj la ĜAn.

Prelego de Bronŝtejn

Mikaelo Bronŝtejn alvenos al Parizo vendredon la 17an de februaro vespere kaj foriros mardon la 21an. Li ne bezonas loĝadon. Li plendas pri la alta kosto de sia vojaĝo ĝis Parizo. Ĉu ni donu iom al li? Se jes, kiom? Niaj kutimoj dum turneo estas pagi la surlokajn kostojn kiel restoraciaj manĝoj kaj la enlandajn vojaĝkostojn al la posta klubo (tiukaze. Caen).

- FLJ proponas doni 100€
- Alia propono estas doni la prezon de la bileto Parizo-Caen plus la restoraciaj manĝoj
- Neniom

La decido estas doni 100€.

Mikaelo Bronŝtejn pretas prelegi dum sia restado, ĉu sabaton la 18an, ĉu dimanĉon la 19an, ĉu lundon la 20an. Kiun daton ni pli ŝatus? Sabaton la 18an je la 17a, la februara esperanta kafejo okazos tuj poste. FLJ elektos la daton kun SAT Amikaro.

Kie okazos la prelego? SAT Amikaro proponas sian sidejon.

La komitatanoj ricevis retroŝte la priskribon de la 24 temoj de prelego, kiujn li proponas. Ĉi-sube listo. Kiu(j)n temo(j)n ni pliŝatus?

Pri la rusa movado

1. Sovetia esperantista junulara movado legendara
2. Zamenhof kaj Postnikov
3. Mi stelojn... (zenito kaj falo de SEU) proponita de FLJ
4. Sonato pri entreprenado (sperto de esperanta entreprenisto)
5. Akceptu mondo min amike (sperto de vojaĝoj) DL ŝatas tiun temon
6. Songoj pri Simeono (gravulo de la rusa movado)

Pri la rusa kulturo

1. Min trafis... (judaj poetoj de la 20a jarcento)
2. Puŝkin (plej fama poeto)
3. De nenie kun amo (Brodskij, nobelpremiita poeto)
4. La mondo de fratoj Strugackij (aŭtoroj de ukronioj)
5. La rusoj en la literaturo de Eo (historio)
6. La lingvoj de miaj gentoj (sperto en multlingva strato, kun kantado) proponita de FLJ
7. Rusiaj bardoj de la 20a jarcento
8. Esperantujo amata tero (pri kantistoj, kun kantado)
9. La verkoj kaj vivtragedio de Osip Mandelŝtam (poeto de la 20a jarcento)

Pri la vivo en Rusio

1. Jen Vorkuta (karbomineja regiono)
2. La miraklofara ikono... (pri ikonoj de la Dipatrino)
3. La ĉefurboj de la rusa ŝtato (historio de la sinsekvaj ĉefurboj) proponita de FLJ
4. Retrospektivo de rusaj festoj
5. La rusa emo ĝardenumi (jam prezentita 26/05/17 dum la nacia kongreso en Mandres-les-roses)
6. La katastrofo kaj ties bardoj (historio de amasmurdoj de judoj)
7. Mondaj eklezioj kaj Eo
8. Poezie kun Mikaelo (spektaklo de liaj poemoj kaj kantoj)
9. Aŭtora horo (prezento de liaj lastaj libroj kaj kantoj)

La prelego estas organizita kun SAT-Amikaro, do ne nur ni decidus. FLJ elektos la temon kun SAT Amikaro.

Agadoj kaj projektoj pluiras

- Babilrondo Parizo-Romo ĉiumonate la 1-an sabaton
- Legoklubo kelkfoje jare
- Esperanto-kafejo ĉiumonate la 2an sabaton vespere (krom escepto)
- Espéranto café-croissant ĉiumonate sabate matene, ekde nun
- Kultura vespero la 3-an merkredon kaj la 1an se eblas

- Ludoj ĉiumonate la 3-an dimanĉon aŭ la 4an
- KER-ekzamenoj: okazis sesio la 26an kaj 27an de novembro
- Prelegoj: kun SAT-Amikaro okazos prelego de Mikaelo Bronŝtejn en februaro
- Vojaĝoj de Lucien Péraire: artikoloj en gazetoj interalie de Régis Fournier, la notoj estas ciferecigitaj, GVN preparas ekspozicion
- Kontakti la mezlernejojn: GVN paŭzas pri tiu projekto
- Subglasoj: GVN, ni kundividis la elspezon kun Esperanto 94
- Kontakti la publikajn bibliotekojn: MP, ni aĉetis dekon da Metodo11 por disdoni, MP bezonas kunulon por viziti, ni ankoraŭ povos proponi enigi la retan adreson de Ikurso en la ĝeneralan katalogon de la parizaj bibliotekoj
- Ministerio pri financaj aferoj: DL, LPI, PG. DL kontaktis la novan respondeculon pri kulturaj sekcioj, kiu favore respondis

Respondeculoj pri agadoj (memorigo)

- Ĝemelurbo kun Romo: MG
- Legoklubo: MG
- Ludoj: AL, Marielle Martin
- Ekzamenoj : FLJ
- Esperanto-kafejo: GVN
- Espéranto café croissant: GVN
- Kulturaj vesperoj: PG, LPI, Régis Fournier
- Prelegoj : FLJ

Notu bone: post evento, la respondeculo sendu informojn (foton, mallongan priskribon en la franca) al teamo.esperanto.aktiv@esperanto-france.org por publikigo en la sekva reta monata gazeto Esperanto-Aktiv

Notu bone: Michèle Abada-Simon pretas helpi kaj ĉeesti niajn eventojn. Necesas informi ŝin antaŭe kaj rememorigi ŝin la tagon de la evento. Ŝia telefonnumero estas 09 54 02 85 12

Informkanaloj

En nia retejo, bonvolu aldoni mension "sekvu nin en sociaj retoj" kun la logotipoj de la sociaj retoj (kun ligiloj).

La unua kanalo estas la retejo <https://esperanto.paris> la aliaj kanaloj reeĥas la informojn

Respondeculoj pri informkanaloj (memorigo kaj reta adreso):

- Retejo DJ (AL) <https://esperanto.paris>
- Facebook MG DL (nur pri kafé) MP <https://www.facebook.com/esperanto.paris>
- Twitter.com/esperanto_paris PG https://twitter.com/esperanto_paris
- Mastodono PG <https://esperanto.masto.host/@esperantoparis>
- Dissendolisto Amikaro LPI (MG) <https://groups.google.com/g/amikaro-francilio>
- Telegramo AL <https://web.telegram.org/z/#-1081874369>
- Amikumu LPI <https://amikumu.com/>
- Eventa Servo MG AK DJ (MP) <https://eventaservo.org/o/Esperanto-Paris>
- Meet-Up DJ

Venontaj kunsidoj

ĜA: 18/03/2023 10a-12a matene

KK la novelektita komitato elektu la novan estraron: 24/03/23 je la 7a ptm, mikse.

FINO DE LA KK